**La babiladaj rondoj** okazos je la **19h30** vendrede

La gastiganto preparas mem simplan manĝaĵon (manĝon kaj deserton). La invitatoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Alfine, ĉiuj donacas monon al la gastiganto por partopreni al liaj elspezoj.

Kiam okazas ĉe Espace Dickens, oni ankoraŭ partoprenas al la lupago.

**"Ambaŭ grupoj" : la 2-an de septembro**

ĉe François Randin, ch. de la Vallombreuse 14, Lausanne

tél. 076 411 14 55

**"Okcidentaj" :**

**la 16-an de septembro**

ĉe Rosario Scopelliti

Ch. de Barberine 6, 1004 Lausanne

Tél. 079 264 41 08

Aliĝu ĉe:

http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

**"Orientaj" :**

**la 23-an de septembro**

ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier

av. des Alpes 150, Montreux

Tél. 021 961 38 56

Aliĝu ĉe:

http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**Bazaro** place de la Palud, Laŭzano **la 3-an / 17-an de septembro**

Por partopreni, aligu ĉe : http://doodle.com/poll/4i9p85gmbb7y7wen


## Laŭzana Esperanto – Societo

Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22

+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch

www.facebook.com/societedesperanto.lausanne

Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo


# Informilo

septembro 2016 – n° 7


Lunde, la 5-an de septembro je la 20-a

ĉe Espace Dickens (Dickens 6), Laŭzano

**Projekciado de la du filmoj**

proponataj al la Ĉina Radio-konkurso "Teo kaj Amo"

***"Amika Invito" kaj "Tetaso amas vojaĝi"***

**Lunde la 3-an de oktobro**

*Karlota kaj la aliaj kongresanoj parolos pri Nitro kaj la UK 2016 en Slovakio.*

**Lunde la 7-an de novembro**

*Decidota temo*


**Sabate la 17-an de decembro**

*Zamenhofa festo*

**Citaĵo**

Libroj por homoj estas kiel flugiloj por birdoj.

*John Ruskin (1819 – 1900)*



# NOVAĴOJ

## *Babilada rondo malsama ol kutime*

Kutime, ni renkontiĝas ĉe unu aŭ alia ano de nia grupo, dufoje monate, por babili, diskuti, ludi esperante. Kaj poste ni kune manĝetas – ofte tro abunde... Estas ĉiam tre amike, tre gaje.
Kaj, same kutime, ni paŭzas dum somero.
Sed ĉi-somere ni estis invititaj ĉe Markus sabate, la 9-an de julio jam je la 11-a matene. Kelkaj el ni alvenis ĉe li trajne, aliaj aŭtomobile. Estis aventuro alveni. Sur la flanko de la montaro, inter Arzier kaj Saint-Cergue, ni trovis mallarĝan vojeton tra la arbaro, vojeton kun multe da truoj, da turniĝoj. Finfine oni malkovris en senarbejo kvartaleton de vilaoj. La plej fora estas lia. Kun sia edzino li ricevis nin en la ĝardeno, fronte al grandega pejzaĝo, vidante la lagon Lemanon, la alpojn, la Blankan Monton, ĝis Ĝenevo kaj ties akvoŝprucaĵo. La vetero belegis. Oni ankoraŭ povis admiri la interesan arkitekturon de la domo, kaj sur la muroj la nombrajn pentraĵojn, kiujn Markus realigis.
Post abunda kuntrinkado de aperitivoj, tre amike Markus kuiris viandojn kaj fiŝojn sur sia rostokrado. Ankaŭ la grupo de Ĝenevo estis invitita, do ni estis ĉirkaŭ 20 partoprenantoj ĉe kelkaj tabloj. La etoso estis tre ĝoja, tre suna, kaj oni festis la x-fojan naskiĝtagon de Knud, kiu komencas sian kvaran kvaronon de jarcento.
Grandegan dankon al Markus kaj al lia edzino, kiuj ricevis nin varmege kaj ofereme. Ĉiuj memoros tiun belegan tagon.

## *Kongresoj*

Ĉijare la UK (Universala Kongreso) de Esperanto okazis en Nitro (Slovakio); kelkaj el ni partoprenis, i.a. Gilbert, Cléa, Andrée, Pierine, Karlota, ktp. Certe ili... ĉefe nia vicprezidantino verkos tekston aŭ prelegos pri sia vojaĝo kaj siaj spertoj... ankaŭ en Hungario.

Aliuloj el LES iris al la jara Itala Kongreso en Frascati apud Romo. Oni atendas ankaŭ iliajn impresojn.

## *Konkurso organizita de Ĉina Radio*

Nia filmisto-sekretario malkovris filman konkurson, kies temo estas: "TEO KAJ AMO". Li proponis al la membraro partopreni la filmadon titolitan: "TETASO AMAS VOJAĜI".




Ni tiel malkovrigos al la spektantoj, pere de tetaso kun verda stelo, la Laŭzanan bazaron, la politeknikon, farmdomon, montan trajnon, lemanan ŝipon, vinberejon. Ĉiuj aktoroj partoprenis plezurege en tiu preparado kaj filmado. Ni esperas, ke la filmo estos tre bone ricevita de la spektantoj... voĉdonantoj... en Ĉinio kaj en la retejo! Ni povos antaŭvidi la filmon dum la venonta kunsido en Espace Dickens. Gratulojn al Francisko, kiu ĉiam imagas kaj realigas interesajn ideojn.